

INTENSA ESPERANTISTA SEMAJNO EN JUNIO

En la dua duono de junio estas programataj diversaj agadoj en Madrido, kiel prologo al la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Teruelo inter la 23a kaj 25a de junio.

La 20an de junio oni prezentos al la ĝenerala publiko la libron “La calle Zamenhof”, hispanan tradukon de la libro “La Zamenhof-strato”, kiu estos ankaŭ prezentata al la esperantistoj dum la teruela kongreso. La eventon ĉeestos la aŭtoro de la libro, la pola ĵurnalisto Roman Dobrzyński. Ĝi okazos je la 7a vespere en la “Casa Sefarad”, en la palaco de Cañete en la strato Mayor, numero 69. Roman verŝajne partoprenos aliajn aranĝojn pri kiuj ni informos poste pli detale.

La 21an de junio la kongreso estos prezentata en la sidejo de la “Casa de Aragón” (Domo aŭ Hejmo de Aragono), en la placo República Argentina, de Madrido. Krom prezentado fare de la prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio kaj de la Organiza Komitato, estas programitaj salutoj fare de aŭtoritatuloj kaj de vizitantoj, premiera deklamado de poemo al la Geamantoj de Teruelo kaj koncerteto de Martin Wiese. Je la fino, oni regalos la ĉeestantojn per modesta kolazio kaj senĝena babilado.

Ni antaŭvidas ke dum tiu tuta tago ni povos munti informan tablon en la placo, por disdoni informojn. Se vi deziras kunlabori, bv. kontakti kun la Liceo.

Aparte, ni pretigas turisman programon por tiuj ekstermadridanoj kiuj venos al la kongreso tra Madrido. Ni planas viziton en la centro de Madrido la 21an, inter la 5a vespere kaj la komenco de la prezentado. Poste la 22an ni faros duan viziton por homoj kiuj restos tiun tagon en Madrido. Atentu la forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn kaj por scii pri aliaj eblaj planoj, aŭ kontaktu kun la Liceo por kunlabori en la organizado.

Pri la kongreso ĝenerale, vizitu la paĝon <http://esperanto.es/kongreso/>, kie jam troviĝas la definitiva programo kun ĉiuj necesaj informoj. En la sidejo troviĝas aliĝiloj, kaj vi povas enskribiĝi ankaŭ rete ĉe: <http://esperanto.es/kongresaligo>.

PUBLIKA PREZENTO DE POEZIO EN ESPERANTO

La 19an de majo okazis la prezentado de la poemaro “Vamos, vemos / Ni iras, vidas”, de la fama hispana poetino María Ángeles Maeso, en dulingva (hispana /esperanta) versio, publikigita de la neesperanta eldonejo Lastura, kaj en traduko kaj kun prologo de la E-poeto Miguel Fernández. La prezentado okazis en prestiĝa madrida kultura spaco: la sidejo de *Nuevo Teatro Fronterizo* [Nova Teatro ĉe la Limo], gvidata de la meritplene renoma hispana dramaturgo José Sanchis Sinisterra. Maeso kaj Fernández i.a. deklamis plurajn poemojn de la libro en la hispana kaj, respektive, Esperanto, en etoso malstreĉa, entuziasma kaj plena de pozitiva energio. Fine ambaŭ poetoj subskribis ne magran nombron da ekzempleroj de la dulingva poemaro. En la ĉi-kuna foto videblas Fernández inter Maeso kaj Sanchis Sinisterra, kiu petis pli da tiel altnivela poezio kaj pli da Esperanto en “Nuevo Teatro Fronterizo”.



Kelkajn tagoj poste, la 24an vespere, Miguel Fernández partoprenis denove poezian aranĝon: migran poemdeklamadon en diversaj placoj de la madrida populara kvartalo Malasaña, kun proksimume 25 aliaj hispanaj gepoetoj. Ĝi estis la lasta programero de la ĉi-jara VersoLab, poezia flanko de la plurfaka festivalo LaborArte. Miguel estis invitita kiel Esperanto-poeto, kaj deklamis versojn proprajn, de Jorge Camacho kaj aliajn, en Esperanto aŭ en la hispana versio, kio vekis simpatian kaj eĉ entuziasmon.

EN KOLOKVO PRI UTOPIOJ

La jaŭdon 25an de majo, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, estis invitita partopreni en kolokvo pri "novaj utopioj", en festivalo "Spectrumfest", iniciato pri novaj teknologioj, kaj simile, kiu disvolviĝis ĉe laboratorio de ideoj de la urbeŝtaro de Madrido, Madrid Lab, en strato Bailén 41, kun konekto kun diversaj aliaj urboj de la mondo.

Registradon de la partopreno eblos baldaŭ spekti ĉe la adreso de la iniciato, ĉe: <http://nooxfera.com/SPECTRUMFEST/Blog/temas/>.

Tie oni povas legi jam blogaĵojn pri Esperanto, ne kiel utopio, sed kiel "pantopio": <http://nooxfera.com/SPECTRUMFEST/Blog/2017/05/una-pantopia-el-esperanto/>.

VIZITIS NIN

Dum kelkaj tagoj vizitis Madridon nia samideano de La Laguna (Tenerifo) Leandro Trujillo. La 25-an de majo, post la prezentado en Madrid International Lab, li renkontiĝis kun madridaj samideanoj.

ALIAJ ANTAŬVIDATAJ KUNVENOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30. Atentu tamen ke pro la esperantistaj renkontoj, ne certas ke dum la du lastaj semajnoj oni malfermos ĝuste lunde, kaj do oni rekomendas kontakti unue kun la sidejo.

Oni ripetos ankaŭ la unuasabatajn renkontiĝojn la venontan 3-an de junio je la 6-a vespere en la sama loko kiel lastfoje, kafejo Café Madrid, en la strato Mesón de Paños, 6 (centra strato, kiu iras el Ópera al la placo Mayor).

La koncerto de Cronómetrobudú, la rokbando kiu registris kanton parte en Esperanto, kiu unua kunvoko devis esti nuligita antaŭ kelkaj monatoj, okazos la 3-an de junio, je la 7-a vespere, en la muzikejo Moby Dick.

La jaŭdon 1-an de junio, profitante la ĉeeston de ĉinia amikino Lisha, kelkaj junuloj rendezuos en la Placo de Sol, ĉe manĝejo Pan's, je la 11-a.

KONTAKTOJ

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com